3-a Jaro. N-o 107

APERAS  SEMAJNE

14. Oktobro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY 14, Avenue de Corbéra, Paris-XII	Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, Rue Boyer, Paris-XX	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

EL LA FAŜISTA ITALIO (1)

Sin kaŝanta socialismo.

Vojaĝanto en Italio povis, antaŭ kelkatempo, per diskretaj demandoj, sciiĝi pri la vera vidpunkto de la popolo rilate la reĝimon de Mussolini. Ĉi-jare, ĉiu magazeno elmontras portreton de li, preskaŭ ĉiu homo portas la faŝistan insignon kaj estas aŭdata nenia kritiko kontraŭ lia politiko.

Mi vojaĝis de Milano en rapidvagonaro. En angulo sidis junulo leganta la ĵurnalon *Corriere della Sera* (La Kuriero de l' Vespero) kaj flanke de li kuŝis alia ĵurnalo, faldita por kaŝi la nomon. Iu viro kontraŭ ni prenis kaj trarigardis ĝin kun stranga mieno, poste zorge refaldis. Ĝi estis la socialista *Avanti!*

La aliaj vojaĝantoj iris en la vagonrestoracion; ni restis solaj kun la junulo. Kun singardemo mi fingre montris unue la sendanĝeran *Corriere'* on.

— Tiu estas la plej bona itala ĵurnalo, ĉu ne?

— La *Corriere?* Ho jes.

— Kaj kiuj aliaj estas bonaj?

Li menciis alian ĵurnalon de nedifinita tendenco.

— Kaj ĉu ne estas ankaŭ... *Popolo d'Italia?*



MUSSOLINI

Ho, tiu estas politika, li diris konfuzite (la frato de Mussolini redaktas ĝin).

— Kaj tiu, kiun vi havas kun vi, *Avanti,* ĉu ne? Kia speco ĝi estas?

Forte ruĝiĝante, embarase kaj senvorte li eltenis ĝin, kaj montris la vortojn « Socialista partio ».

— Ha, mi diris, do vi estas socialisto?

Li levis la ŝultrojn nee.

— Do kio?

Li faris dubeman geston. — Nenio — Tiam, komprenante, ke la konfeso povus okazi sendanĝere, li aldonis subvoĉe: — Ne faŝisto.

— Vi estas la unua kiu kuraĝis tion diri, mi respondis bonintence.

Li gestis strangmaniere, prenante siajn lipojn inter du fingroj kvazaŭ per pendseruro. Mi denove demandis kiun partion li apartenas, kaj responde, ankoraŭ senvorte, li malfaldis sian ĵurnalon kaj elmontris la rubrikon « Socialista partio ».

Estas malfacile daŭrigi konversacion mute. Al nia demando, kial tiom multe da fervojistoj portas la Nigran Ĉemizon, li nur elĵetis la vorton: « Devigitaj »! Ni enketis, ĉu la italinoj estas ankaŭ implikitaj en la luktado kontraŭfaŝista, al kio li respondis: Pli ol la viroj: ili unue spertas la altajn prezojn.

Por doni al li fidon, ni ĉirkaŭeme parolis ĝenerale pri italoj en Londono ĝis la fakto, ke ni aŭskultis lekciojn de itala profesoro nomita Salvemini. Ĉe la nomo li ekenspiris kaj per duonvoĉo provizis la informon, ke Salvemini estis persekutata, batata kaj devigata forkuri de Firenza. Mi sciigis lin, ke ni eĉ parolis kun Salvemini. Ĉe tio, kun konfido, li deprenis de la breto dikan kajerujon. Ĝi estis plenigita per ekzempleroj de *Avanti!*

---

(1) Ni preferus publikigi originalajn raportojn de la tieaj K-doj. Bedaŭrinde ili absolute silentas. Tial ni devis represi jenajn tradukojn el « The Daily Herald » (La Ĉiutaga Heroldo), Londono.

Ni profitu la okazon por konigi la strangan fakton, ke preskaŭ nur el Sovetio ni ricevas presindajn artikolojn. Kion konkludi el tio? Interesa demando. Studinda problemo. — *Red.*

— Propagando, li murmuretis kaj fermis rapide la kajerujon.

La reveno de la manĝintoj malhelpis pluan konversacion. Kelkajn horojn pli malfrue ni aŭdis iun, kiu staris sur la perono, rakonti novaĵon al amiko en la vagonaro per mallaŭta voĉo. La lasta kviete transdonis la sciigaĵon al kunulo. Estis rakonto pri la evito de Mussolini rilate anarkistan bombon, kaj la novaĵo estis aŭdata sen ia elmontro de emocio; neniujn demandojn, neniujn ekkriojn, neniujn rimarkojn. Antaŭ la ĵurnal-butikoj homoj legis la afiŝojn en silento. Tamen la italoj estas flama kaj ekcitema popolo!...

Fiagado en Molinella.

Antaŭ la faŝista teroro, la regiono de Molinella estis mondfama pro la lerteco kaj laboremo de siaj terkulturistoj. Iliaj modelaj kooperativoj altiris la atenton de spertuloj el ĉiuj partoj de Eŭropo.

Sed, ĉar Molinella estis « ruĝa » — ĉiu tiea laboristo estas sindikatano, kooperativano kaj socialisto — ĝi ricevis specialan atenton de la faŝistoj. Tiuj forbrulis la kooperativajn konstruojn kaj ŝtelis la kasenhavojn, batis kaj eĉ mortigis la gvidantojn laboristajn. Sub la estreco de Regazzi, fifama mortigisto, plej ega teroro daŭris dum kvar jaroj. Tamen tio ne aliigis la spiriton de tiuj nevenkeblaj kamparanoj, kiuj ankoraŭ senkaŝe sin konfesas socialistoj kaj sindikatanoj kaj ĉiam rifuzas aniĝi la faŝistan unuiĝon.

Nu, lastatempe la faŝistoj ordonis, ke neniu terposedanto dungu aliun ol anon de la faŝista sindikato, kaj la dungantoj kompreneble timas malobei, kvankam la importitaj laboristoj estas nekompetentaj.

Forpelite de sia laboro, la Molinella-anoj provis akiri kelkan vivrimedon per postrikoltado (ĉiama rajto de la italaj malriĉuloj), sed nun eĉ tion oni malpermesas al ili, kaj sekvas la lasta fiago de Regazzi — la ordono, ke ĉiu domposedanto forpelu de lia hejmo ĉiun anon de la senleĝa Socialista Konfederacio de Laboro. Eĉ homoj kiuj posedas siajn proprajn domojn ricevis averton, ke ili lasu ilin por faŝistaj anstataŭontoj antaŭ la 29-a de septembro. Se ili ne tion faros, se ili ne forvagados por sperti senlaborecon, senmonecon kaj senmanĝecon, Regazzi kaj liaj pafilistaĉoj denove faros el Mollinella kampon por rabo, besteco kaj sendube mortigado.

Meksikio kaj Romo

Ĉu forlasos Romo facile sian multcentjaran kaptaĵon? Certe ne. Romo ege klopodos por ĝin konservi. La estraro de la meksikiaj romkatolikaj pastroj, proklamante la strikon por la 31-a julio, esperis, ke la popolo kaj armeo ribeliĝos, kaj ke prezidanto Calles (Kajes) estos almenaŭ bruligata kun siaj samideanoj.

La 5-an de aŭgusto, S-ro Leguia, prezidanto de Peru, sendis telegramon al prezidanto Calles, en kiu li pledis por la pastraro. Calles senprokraste respondis: «Tio ne estas religia afero, sed politika. Meksikio ne permesos eksterlandan enmikson. »

La plej forta laborista organizo meksikia, CROM (1), aranĝis komence de aŭgusto, publikajn polemikojn pri la konflikto. En unu paroladis la ministro por Instruado, D-ro Casauranc (Kazoran), finante per jenaj vortoj: La meksikia registaro ne povas permesi, ke la idaro estu edukata en la samaj ideoj, truditaj al ni en la lernejoj, la edukado por tiaj molaj cerboj devas esti laika. La plenkreskuloj decidu mem pri religiaj kredoj. La polemikado vekis tian intereson, ke la teatro estis plenplena. La paroladoj estis disaŭdigataj, ĉiuj ĵurnaloj raportis pri la diskutoj. Oni postulis la daŭradon de tiaj polemikoj, sed la pastroj ne konsentis, timante pluajn malvenkojn.

Dume, la pastraro aktive agis por savi sian aferon. Ili multe propagandas en eksterlando per usonaj ĵurnaloj kaj movigas la por katolikajn influojn en la tuta mondo. Delegacio de ĉefaj episkopoj aperis antaŭ Calles kaj petis lin ŝanĝi la leĝon aŭ tion rekomendi. Li respondis: Pri ŝanĝoj turnu vin al la Deputita Ĉambro; kaj rekomendi tiajn ŝanĝojn, mi tute ne povas, ĉar tio estus ago kontraŭ mia filozofia opinio.

La nova Ĉambro dum la malferma kunsido, la unuan de septembro, aŭdis la registaran jaran informon. Kiam la ministro por Internaj Aferoj legis sian raporton, dirante, ke la katolika pastraro ribelis kaj klopodas ribeligi la popolon, sed ke malgraŭ tio la registaro ne cedos eĉ paŝon, tiam la deputitoj ekleviĝis amase de la sidlokoj, entuziasme lin aplaŭdegante.

La okan de la sama monato, la pastrestraro sendis al la Ĉambro petskribon, en kiu ili interalie postulas: liberecon por havi bienojn, por procesii, por eduki la infanaron katolike.

Pastrara letero, jus disdonita al la gefideluloj, instigas ilin elteni kaj helpi, ke la papo triumfu, aldonante ke la tuta mondo rigardas nun Meksikion kaj pro tiu estus malbone kaj malbele se Meksikio iĝus same kiel la malfeliĉaj sendiaj ŝtatoj, ekzemple Rusio. Pro tio estas la ĉefa tasko de ĉiu kristano klopodi, ke la registaro cedu kaj ŝanĝu la leĝojn. Plue diras la letero: «Ke mirakloj jam ne plu ekzistas por niaj tempoj kaj neniun savos dio sen propra volo kaj klopodo.» Pluan konfeson entenas la letero, nome: «La subaj pastroj informis nin, ke la popolo komencas perdi la intereson pri la bojkoto; ni ja scias ke nek mankas timemuloj nek perfiduloj sed vi devas nepre montri vian egan fidon» ktp., ktp...

Ekster Meksikio oni pensas la konflikton grava kaj serioza, ĉar la sciigagentejoj multe raportas. Sed tio estas nur memkomprenebla, ĉar la korespondantoj bezonas multajn kaj sensaciajn sciigojn, kiujn ili ĉiam, kun plezuro, ricevas de la episkopaj fontoj. La pastraro nature uzas ĉi okazon, vidante, ke la registaro ne malpermesas kaj ne baras tiajn friponajn agojn; ja ne ekzistas ia cenzuro.

Jesus Amaya.

(1) Vidu la n-ron 101 de « S-ulo ».

LA ŜIITA FUNEBRA FESTO AŜURÀ EN SOVETA TURKMENIO

Ĉiujare la unuajn dek tagojn de la luna monato Moharram la ŝiita religio dediĉas al la funebro pri la plej honorata sanktulo imamo Hossejn, mortigita en la jaro 679. Naŭ tagojn freneziĝas en ŝiitaj moskeoj iranoazerbejĝanoj. La ortodoksuloj histerie ploregas, bategas sin per ĉenoj, trapikas la karnon per rusta drato kaj pendigas al ĝi pezilojn (kies pezo montras la religian fervoron!). Ili sin vundas per ponardoj kaj akraj lignaĵoj, dishakas la haŭton sur la kapo.

Ĉiu ortodoksa ŝiito opinias kiel sian devon partopreni en la funebro, fordonante al imamo Hossejn sian sangon, doloron de la vundita korpo kaj monon. Sed, ĉar en kapitalista socio ekzistas divido de laboro, kaj sango kaj doloro egalas monon, irano-azerbejĝana burĝaro cedas la honoran rajton de memturmentego al la laborularo, preferante elaĉeti sin per mono, trasorbita de laborula ŝvito.

La partopreno al la memturmentego igas la fanatikulojn, labormalkapablaj por kelkaj semajnoj, difektas ilian organismon kaj nervsistemon.

La kaŭzo de tiu-ĉi malluma, mezepoka teruraĵo estas nur sola aspiro de la pastraro kaj burĝaro teni irano-azerbejĝanajn laborulojn en blinda obeemo al si.

Sed la malriĉularo komencas liberiĝi de l' jugo.

Eĉ en Persio, kie por la konvinkigo de la ŝanceliĝantoj, la ĉefa eklezio havas tiajn tiom efikajn rimedojn, kiel juĝon, konfiskon de la posedaĵo, malliberojn, ktp., ĉiujare seniluziiĝintoj (mezburĝoj kaj laboruloj) foriras de la ŝiitismo.

La kontraŭklerikala bahaismo varbas siajn disĉiplojn inter tiuj-ĉi homoj, kiuj malamas pastraĉojn diverskolorajn kaj precipe sejjed'ojn. Unu el la kaŭzoj de tiu-ĉi malamo estas la neskribita leĝo, kiu ekzistas en Persio kaj ĉiun ŝiiton devigas oferi kvinonon de sia havaĵo al la sejjed'oj « la idaro de la profeto Mahometo ». Ja, la sejjedoj kun aroganteco

diradas, ke ĉiu kvina fingro sur la mano de la ŝiito estas la propraĵo de la profeta idaro!

Des pli seriozan bataladon devas gvidi la ŝiitaj pastroj en Soveta Turkmenio, kie ĉirkaŭ 60 % irano-azerbejĝanoj estas membroj de sindikatoj, kie la influo de socialistaj doktrinoj estas tiom forta, ke eĉ la mulla'oj (*) devas paroli pri komunismo de la islamo kaj pri socialisteco de Mahometaj principoj.

Precipe ĉi-jaro estis malfacila por la ŝiita pastraro de Turkmenio. Tion kaŭzis, sukcese efektivigita kampanio kontraŭ la Aŝurà (tiel nomiĝas la funebro), vigla profesia kaj kompartia laboro en irano-azerbejĝanaj medioj, la dekreto de la Turkmenia Popola Komisario de Internaj Aferoj pri la malpermeso de funebraj procesioj kaj memturmentegoj sur la stratoj, kaj fine la perslingva ĵurnaleto « Zahmet ».

Multaj ŝiitoj volonte vizitadis kunvenojn kontraŭ « Aŝurà », kiujn aranĝis partiaj komitatoj kaj sindikatoj, aŭskultis lekciojn de doktoroj pri fiziologia malutilo de « Aŝurà ».

Rezulte de tio en Turkmenio partoprenis al la memturmentego nur 45 % kompare al la jaro 1925. Speciale en la ĉefurbo Asĥabad-Poltorack sin turmentis nur 500 persoj. Krom tio unu moskeo, konsiderante la spiriton de la nuntempo pasigis la funebrajn tagojn sen memturmentegoj.

Do, venko de la novaj ideoj estas nedubinda, sed tiu-ĉi venko ne sufiĉas. Ankoraŭ granda parto da turkmenia persa laborularo troviĝas en turmentoj de kultura naskiĝo.

El « Turkmena Fajrero » kompil-tradukis
S. Bojev.

Sciigoj el Svedio

Laboristoj mizeriĝas.

Ĵus eldonita oficiala statistiko, kiu estas bazita laŭ profesioj, enspezoj kaj posedaĵoj de la svedaj loĝantoj en la fino de l' jaro 1920, montras, ke la tuta privata posedaĵo valoras je pli ol 14 miliardoj da kr. svedaj. El tiu posedaĵo la gelaboristaro, kiu estas pli ol 1 miliono krom edzinoj kaj infanoj, posedas nur 2.5 %, dum la mallaboraj profituloj posedas pli ol 90 %. La meza posedaĵo de la industrio kaj metiposedantoj estas 6448 kr., sed tiu de la laboristoj nur 149 kr.

Elektoj.

Elektoj nun faritaj en la svedaj gubernioj, donis la rezulton, ke la maldekstruloj, gajnis kelkajn mandatojn je la dekstruloj, reakciuloj. Tio estis elektoj por la guberniaj parlamentoj (« landsting »). Tiuj parlamentoj siavice elektas senatanojn por la tutsveda leĝdona parlamento (« riksdagen »), kiu konsistas el senato — la unua ĉambro — kaj la senpere popolelektita dua ĉambro.

Kontraŭ la trustoj.

La sveda konsum-kooperativa centro (« Kooperativa Förbundet ») dum sia kongreso fine de junio ĉijare ankaŭ pridiskutis, kiel oni povu rompi la monopolon de la galoŝtrusto, kiu tiel plialtigis la prezojn de galoŝoj en Svedio, ke oni povis aĉeti svedajn galoŝojn pli malkare en eksterlando, kie la trusto trovis konkurencon de aliaj fabrikantoj kaj tamen vendis galoŝojn profitdone. Voĉoj laŭtiĝis por la konstruado de kooperativa-galoŝfabriko, sed ne estis definitiva decido de la kongreso.

Intertempe la kooperativo alvokas la konsumantojn procentigi monon en industrian fondon kooperativan. Tio bone efikis kontraŭ la trusto, ĉar ĝi jam malaltigis la prezojn de galoŝoj je 2 kr. po paro.

Sed ne estas certe, ke la kooperativo pro tio rezignos la efektivigon de propra galoŝfabriko, ĉar la konsumantoj pli kaj pli amasigas siajn fortojn ĉirkaŭ la kooperativo por rompi la rabajn monopolojn de la kapitalistaj trustoj.

994.

(*) Mullà — musulmana pastro.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

INSISTA ALVOKO

La Protokolo de l' VI-a Kongreso estas nun en la manoj de kompostistoj. Post du semajnoj ĝi estos finpresita kaj aperos sub formo de **64**-*paĝa broŝuro, kiun ricevos* **senpage** *ĉiu SAT-ano.*

Ĉi-okaze ni atentigu, ke la malalta SAT-kotizo eĉ ne sufiĉas por pagi la Jarlibron, kiun ankaŭ la membroj ricevas senpage. Aliparte, se oni memoras, ke ni malaltigis lastatempe la prezojn de ĉiuj niaj eldonaĵoj, estas evidente, ke ni povos en tiuj kondiĉoj elteni la situacion, nur se pligrandiĝos la nombro de anoj, la nombro de abonantoj al Sennaciulo *kaj* Sennacieca Revuo, *la nombro de aĉetantoj de niaj libroj.*

Ĉiu do konsciu sian devon: ĉiu varbu, varbadu; ĉiu donacu por la « Jubileo-ĉeno »; unuvorte ĉiu agu SAT-aninde...

K-doj! ne prokrastu plenumi vian devon; ni mem ne povas prokrasti la pagadon al la presistoj...

E. K.

Laborista buĝeto en USSR

La vivnivelo de l' rusa laboristo antaŭ la revolucio estis tre malalta. Ĝia meza salajro por la tuta fabrik- kaj min-industrio ne superis 300 orrublojn jare. Tio egalas ĉe 257 labortagoj nur 1 r. 17 kop. por dekhora tago aŭ ĉirkaŭ 7 rublojn semajne.

La germana laboristo en 1913 ricevis semajne ĉirkaŭ 12 rub.; la angla — ĉirk. 14 rub.; la usona, eĉ 24 rub., t. e. preskaŭ kvaroble pli ol la rusa.

Vere, kalkulinte la diversajn nivelojn de l' vivkareco en diversaj landoj, tiu salajra diferenco grave malgrandiĝus. Juĝante laŭ la nutraĵ- kaj loĝej-kostoj, la angla laboristo antaŭmilite devis plipagi, kompare kun la rusa — minimume 40 %, kaj la usona ankoraŭ pli — ne malpli ol 100 %. Sed eĉ kun tiu ĉi korekto la salajron, en antaŭrevolucia Rusio kompare kun Okcidento, necesas konstati treege malalta.

La mondmilito, kaj poste la kruela interna civit-batalado en Rusio, certe, ankoraŭ plimalaltigis la mezan vivnivelon de l' rusa laboristo. Sed komencante de 1921 j., post kiam la lastaj fortoj de l' kontraŭrevolucio estis rompitaj, komenciĝis revivigo de la landmastrumo kaj la vivnivelo de l' laboristo en USSR rapide plialtiĝis.

Ankoraŭ en 1922/23 j. la meza salajro de l' industria laboristo apenaŭ atingis 232 orrublojn jare. En 1923/24, ĝi jam altiĝis ĝis 423 rub., en la sekvinta jaro — ĝis 525 rub., kaj en 1925/26 laŭ la kontrolnombroj de « Gosplan » ĝi jam atingis 631 rub. jare, kaj se oni aldonas ankoraŭ ĉirkaŭ 16 %, pagataĵn de la entreprenoj por la laboristoj kiel socian asekuron, tiam la vivnivelon de l' sovetlanda proletaro oni devos kalkuli ankoraŭ pli alta. Vere, la vivkosto nuntempe ĉe ni estas preskaŭ duoble pli alta ol antaŭmilite. Sed eĉ kalkulante tiun trokarecon, *la vivnivelo de nia laboristo jam nun estas multe pli alta ol antaŭmilite.*

La ĝenerala strukturo de l' buĝeto de la laborista familio en USSR, laŭ la lastaj studoj, estas jena:

La strukturo de l' buĝeto de laborista familio en USSR.

En %

	Por komenco de 1925 j.	1926 j.
Enspezo.		
1. Salajro	78.4	82.0
2. Socia asekuro	2.9	4.2
3. Enspezo de la metio, legomĝardeno ktp.	3.3	3.1
4. Kredito kaj ŝuldrepago	7.1	6.4
5. Havaĵvendado kaj eluzo de l' ŝparitaĵo	6.4	2.5
6. Helpo de l' parencoj kaj aliaj	1.9	1.8
Sume	100.0	100.0
Elspezo.		
1. Loĝejo	5.3	5.7
2. Hejtado kaj lumigado	8.7	6.8
3. Nutraĵo	45.8	44.5
4. Alkoholo	1.1	2.1
5. Tabako, cigaredoj kaj alumetoj	1.5	1.4
6. Vestaĵo, lavado	20.0	23.1
7. Mastrumobjektoj	2.7	2.9
8. Higieno kaj kuracado	0.9	0.9
9. Kultur-klerigaj elspezoj	2.1	1.9
10. Kotizoj al laboristaj organizoj	3.3	2.1
11. Religio	0.1	0.0
12. Repago de ŝuldoj kaj kredito	2.9	2.8
13. Pruntedono	0.2	0.2
14. Helpo al forestantaj familianoj	1.0	1.1
15. Aliaj elspezoj	4.4	4.5
Sume	100.0	100.0
Monata enspezo de l' familio en rubloj	79.90	97.90
Monata elspezo de l' familio en rubloj	79.63	97.55
Nombro da familianoj en la familio	4.1	4.1
Nombro da neenspezantaj familianoj	2.80	2.78
Nombro da enspezantaj familianoj	1.18	1.22
Nombro da esploritaj mastrumoj	1.278. »	1.402. »

Necesas noti, ke en la cititaj nombroj ne estas kalkulitaj kelkaj, tre gravaj por la laborista buĝeto aferoj. Ekzemple en la enspezo je kosto de l'kapitalo de la socia asekuro estas montrita nur la monhelpo ricevata diverskaŭze en la laborista familio konstante.

Sed tute ne estas kalkulitaj la senpagaj

ambulanca kaj malsanuleja kuracado, medikamentoj, kosto de l' estado en la ripozdomoj kaj kuraclokoj dum la libertempo kaj multo alia.

Pro tio la kalkulıtajn elspezojn por la kuracado kaj higieno necesas kalkuli tre malgrandigitaj. Pro sama kaŭzo ne plene estas kalkulitaj la elspezoj kultur-klerigaj de l' soveta laboristo, ĉar la maniero de la buĝeta esploro malebligas kalkuli tiujn elspezojn, kiujn je interesoj de l'kultura ripozo kaj politika klerigo de l' laboristoj faras ĉe ni la regno kaj sindikatoj. Sed des pli karakterizaj estas la malaperantaj laŭ sia grandeco elspezoj de l' sovetia laboristo por la religiaj bezonoj. Evidente, dank' al kresko de la kulturnivelo de la laborista amaso, ĝia bezono je religia opio fariĝis tute malgranda.

La nutrado de l' laboristoj en USSR dum la lastaj jaroj rimarkeble superis la antaŭmilitan normon. Laŭ la antaŭmilita buĝeto la taga nutrado de l' maturaĝulo en la laborista familio ĉe ni ne superis 3.300 kaloriojn. Dum la civita milito kaj blokado ĝi malaltiĝis ĝis 2.400 kalorioj kaj en kelkaj distriktoj eĉ pli malalten. Sed jam en decembro 1922 ĝi altiĝis ĝis 3.800 kalorioj por ĉiu, kaj de tiam plu ne altiĝis laŭnombre, sed ĉiujare pliboniĝis kvalite.

Ekzemple, la nutrado per produktoj bestdevenaj en 1922 j. egalis nur 4.4 % el la nombro da konsumitaj kalorioj, en 1923 j. ĝi altiĝis jam ĝis 7.7 %, kaj en 1924 j. ĝis 12.5 %. La tritikpano en la tuta amaso da konsumita pano en 1922 j. egalis nur 10 %, en 1923 j. — 30 %, en 1924 j. — 45 %; la graskonsumado dum du samaj jaroj kreskis 33 %, la konsumado de lakto — je 73 %, sukero — je 146 %, viando, je 335 % ktp. Samtempe la konsumado de terpomoj malaltiĝis je 20 %, kaj de sekalpano eĉ je 48 %.

Tiaj estas la krudaj faktoj.

Memkompreneble, ke ankaŭ nun la vivnivelo de l' laboristo en USSR ne estas alta. *Sed gravas tio, ke ĝi altiĝas ĉiujare kun rapideco observebla en neniu alia lando.* Kaj ni neniel dubas, ke ĝi ankaŭ estonte kreskos proporcie al la ĝenerala kresko de la produktofortoj de la lando.

(Leningr. Pravda.) Elrusigis GEO. TETERIN.

La jubileo-ĉeno de SAT

K-do G. P. de BRUIN (Nederlando) donacas 2 1/2 guldenojn kaj alvokas *ĉiujn* holandajn K-dojn, ke ili ankaŭ helpu en la forĝado de forta jubileo-ĉeno.

★

« La afero pri jubileo-ĉeno ŝajnas al ni burĝeca » skribis iu K-do. Povas esti. Sed ĉu estas pli *proleteca* konservi por si la monon, kiun oni povus donaci por helpi sian esperantan proletan organizon?

Donacemuloj! ne timu similajn riproĉojn, helpu ebligi, ke SAT povu eldonadi valorajn verkojn.

Fizik-kultura movado en U. S. S. R.

La signaldiro « Fizikkulturo estu rimedo por sanigo de la laboruloj » evidentigas, ke tiu ĉi movado en U. S. S. R. ne nur estas sportafero, sed soci-kultura faktoro, al kiu oni atribuas gravan signifon.

Ĉiuj grupoj fizkulturaj laboras sub la observado de kuracistoj, kiuj post medicina inspekto permesas al interesato praktiki gimnastikon ktp. Krom tio dumjare dufoje okazas kontrolo per kuracistoj pri la sano de la membroj. Por sportaj konkuroj ankaŭ necesas permeso de kuracisto.

Tio nur estas la ŝtata zorgo pri laŭcela kaj efika sportado. Krom tio soveta « fizkulturo » havas kelkajn originalecojn. Ne ekzistas tie specialaj kaj memstaraj ligoj por pilkludoj, atletiko, ktp., sed organizaĵoj celantaj eviti la unuflankan formiĝon de l'korpo kaj aspiri korpan pliboniĝon pro la sano. La eduko de la fizkulturanoj ne estas finita per la fortiĝo de la muskoloj, sed oni ankaŭ zorgas pri soci-kultura kleriĝo. Tial estas fonditaj la fizkulturaj grupoj plejparte ĉe la laboristaj kluboj, profunuiĝoj, vilaĝanaj domoj, leĝejoj, Komsomolaj ĉeloj kaj ĉe aliaj sociaj organizaĵoj. La grupoj fonditaj ĉe tiaj organizaĵoj laboras sub ties gvidado kaj kune kun ili sur socia kampo. Krom tio, la grupoj ankaŭ memstare laboras per aranĝo de paroladoj pri la direkto de soveta fizkulturo pri politikaj temoj, kaj interparoloj pri la Ruĝa Sport-Internacio ktp. La fizkulturanoj ĉiam estas pretaj plenumi siajn taskojn sociajn ĉar ili estas gefiloj de la laboristaro.

En U. S. S. R. komence de l' jaro 1926 nombris ĉiuj fizkulturanoj ĉirkaŭ 2.500.000 kaj laŭ R. S. J. S. R., — grupoj pli ol 9.000. Ĉiumonate rimarkinda kresko de tiu ĉi nombro estas konstatebla.

La Soveta Registaro havas specialajn organojn por la gvidado de la movado, nome la fako « Supera Soveto de Fizika Kulturo » gvidanta la movadon ĝenerale. La guberniaj, regionaj kaj aliaj provincaj Ekzekutivaj Komitatoj de Sovetoj ankaŭ havas similajn « Sovetoj de Fizkulturo ».

NIKOL. MATJAS, Smolensk.

Iom pri soveta kooperativismo

Dum pli longa tempo mi ne trovis en SENNACIULO eĉ malgrandan artikoleton pri kooperativaj demandoj, malgraŭ tio, ke raportoj pri kooperativista vivo de aliaj landoj certe interesus multajn SAT-anojn. Mi pro tio proponas, ke la paĝoj de « S-ulo » de nun estu pli ofte uzataj ankaŭ por informoj pri la kooperativmovado en la diversaj landoj, sed por tio necesas ke la K-doj kunlaboru. Estus necese pritrakti la demandojn: 1) Kia estas la sociala konsisto de la kooperativoj; 2) Kiajn kapitalojn administras la kooperativaj organizoj; 3) Kiaj estas la komercaj spezoj de la organizo; 4) Kiel kaj kiun ĝi priservas; 5) Kiel partoprenas la laboruloj en organizado kaj administrado de kooperativoj ktp. Mi mem komencos per kelkaj ciferoj kaj informoj pri Sovetio.

Estas atentinde, ke la sovetaj leĝoj malpermesas akcepti nelaborulojn (ekleziajn servantojn, komercistojn, eksoficistojn de la cara polico ktp.) kiel membrojn de kooperativoj. Entute la aniĝo estas malpermesata por ĉiuj, kiuj ne havas, laŭ la konstitucio de S.S.S.R. balotrajton. Laŭ la leĝo estas la kotizo fiksita kun ne pli ol 5 rubloj, la celo de tio estas garantii laŭeble multnombran partoprenadon al la kooperativoj de la malriĉuloj. La kooperativaj taskoj estas gardataj kaj subtenataj per specialaj dekretoj de la registaro.

La sukcesoj de la sovetaj kooperativoj estas tre grandaj: la konsumkooperativoj havas nun en iliaj vicoj preskaŭ 10.000.000 da anoj, tio estas preskaŭ 7 % de la tuta loĝantaro de U.S.S.R. Komparite kun la antaŭmilita tempo 25 obla pligrandiĝo de la anaro. La amplekson de la partoprenado de kooperativoj al la komerco regna, oni povas konstati el tio, ke preskaŭ 70 % de la industriaj komercaĵoj iras tra la kooperativoj. Laŭ la statistiko de 1925 la konsumkooperativoj konsistis el 26.000 apartaj organizoj kun kune 51.000 komercejoj. El tiu ĉi nombro estas preskaŭ 24.000 vilaĝanaj organizoj kiuj posedas preskaŭ 36.000 komercejojn. La sovetaj kooperativoj nun ankoraŭ malsanas rilate al la kooperativigo de la vilaĝa loĝantaro, nuntempe el la urba loĝantaro estas kooperativanoj 30 %, sed el la vilaĝa nur 4 %.

Laŭ raporto de K-do BROJT *(5246).*

SCIENCO - TEKNIKO

Sunmakuloj kaj vetero.

La longjaraj observadoj de l' fama usona observejo Monto Wilson, sub gvidado de Prof. Hale, pruvis la influajn rilatojn inter la apero de sunmakuloj kaj la pluvaj periodoj sur la tero. La nunjara pluvvetero akompanita de ventegoj, superakviĝoj ktp. ĝuste koincidis kun la proksimiĝo al la dum ĉiu dekunua jaro atingata maksimumo de l' makuloj.

La moderna astronomio klarigas la makulojn kiel malpli helajn gastavolojn, videblaj pro la kontrasto inter la pli hela grundo. Ĉi makuloj estas elektromagnetaj kirloj, elradiantaj kolosajn fluojn da elektronoj, kiuj ankaŭ efikas surtere igo de magnetaj malekvilibroj, estigo de polusaj lumoj, malbonfunkciigo de radiosendado kaj fine veterinfluo. Nome, la elektronoj estas *kondensigaj* punktoj por la malseko de l' atmosfero kaj pro tio akcelas ege la estiĝon de nubaro. Nature dum maksimumo de makuloj ĉiuj fenomenoj estas plej intensivaj kaj kaŭzas veterkatastrofojn.

★

La aĝo de la tero.

Interesan prikalkulon, bazanta sur ĉiuj modernaj sciencaj konsideroj, faris nun jare Prof. Schmiedel de la argentina universitato en Corrientes. La nombroj estas minimumoj.

Tempospaco pasinta depost la krust-estiĝo 800-1000 milionoj da jaroj;

Tempospaco pasinta depost la mar-estiĝo 300 milionoj da jaroj;

Tempospaco pasinta depost la temperatura maksimumo 1800 milionoj da jaroj.

La terdiametro estis ĉe komenco de la marestiĝo 120-130 km., ĉe komenco de la krustestiĝo 360-400 km. plilonga ol nun. Malvarmiĝis nur la ekstera dekono de la tero, en la internaj naŭ dekonoj regas ankoraŭ temperatura maksimumo de 4.700 gradoj, laŭ Celsio-term.

H. MURAKVIN.

★

La esplorado de la Kurska magneta anomalio estas finita. Oni trovis, ke ĝi estas kaŭzata per la konsisto de proksimume 20-40 miliardoj da tunoj da pura fero. Ĝi kuŝas en 150-metra profundeco; la procentaĵo de pura fero en la minaĵo estas 30-50 %. En la tuta cetera Eŭropo (krom Kursk) estas konata la ferekzisto de proksimume 13 miliardoj da tunoj.

★

En la jaro 1926-27 en tuta Sovetio la semita arko atingos 97 % de la antaŭmilita amplekso. La komunaj kostoj de l' tuta agrikultura produktado estas difinata je 10.723 milionoj da rubloj kontraŭ 10 miliardoj en 1925-26 kaj 11.163 milionoj en 1913.

Elrusigis SKIJ.

☆ DISKUTEJO ☆

Ĉu la socialismo estas efektivigita en Sovetio?

(respondo al K-dino *Mondhejmulo*, SENNACIULO, n-ro 102)

Oni ne povas opinii, ke, ekdorminte hodiaŭ en kapitalisma socio, oni morgaŭ povas vekiĝi en socialisma. Marx skribis:

> « Inter kapitalisma kaj komunisma socio estas periodo de revolucia transformigo de l' unua en la duan, kaj la ŝtato de ĉi-periodo povas esti nenio alia, krom revolucia diktaturo de l' proletaro. »

Sovetio nun nome travivas la transiran periodon, — la proletaro efektivigas la tutan plenon de regna potenco, disvolvigas sian industrion. Ĉi-tio nun jam ne postulas pruvojn.

K-ino Mondhejmulo, mirante pri salajrdiferenco en Sovetio, verŝajne la vorton « socialismo » uzas anstataŭ la vorto « egaleco ». Ni ree turnos nin al Marx. — Malsimile al la neklaraj, ĝeneralsencaj frazoj de Lassal (« plena produkto de laboro por laboristo », « rajto de egaleco »), Marx starigis la demandon pri rajto de egaleco en komunisma socio, ĵus elirinta el la kapitalisma, jene:

> « Malgraŭ la progreso, ĉi-tia « rajto de egaleco » ankoraŭ konservas sian burĝan limon. Rajto de produktistoj proporcie liverita de ili laboro, egaleco, konsistas ĉi tie en uzado de komuna por ĉiuj mezurilo-laboro. Sed unu homo estas pli forta ol alia, fizike aŭ intelekte, kaj pro tio ne povas dum la sama tempo ekfari pli, aŭ labori pli longan tempon, kaj la laboro, por esti mezurilo, devas esti kalkulita konforme al sia daŭreco aŭ intenseco, sen kio tuj ĉesus ĝia rolo de mezurilo.
>
> La rajto de egaleco fariĝas rajto de malegaleco por malegala laboro. Ĝi ne konas klasajn diferencojn, ĉar ĉiuj homoj estas nur laboristoj de sama rango, sed ĝi silente konfesas naturajn privilegiojn de la malegaleco de individuaj kapabloj, do produktigaj kapabloj de individuoj.
>
> Do, laŭ sia enhavo, ĉi-tiu rajto, same kiel ĉia rajto, estas rajto de malegaleco...
>
> Sed ĉi tiuj domaĝoj estas neeviteblaj dum la *unua fazo de komunismo*, ĵus elirinta post longdaŭraj turmentoj de nasko el la kapitalismo...
>
> Sur la plej alta ŝtupo de disvolvo de komunisma socio, post tio, kiel foriĝos la sklavigata subigo de l' homo al la leĝo de disdono de laboro kaj, kune kun tio, al maleco de intelekto kaj fizika laboro, kaj la laboro mem ĉesinte esti nur rimedo por vivo, fariĝos unua bezono de vivo, kiam kune kun ĉiuflanka disvolvo de individuoj diskreskos produktigaj fortoj kaj ĉiuj fontoj de l' socia riĉaĵo ekfluos je larĝa rivero, nur tiam, unuan fojon, dislarĝiĝos mallarĝa horizonto de burĝa socio kaj la socio ekskribos sur sian standardon: Ĉiu produktu laŭ sia kapablo kaj ricevu laŭ sia bezono. »*) (Ibid.)

Lenin, en sia verko « Ŝtato kaj Revolucio » (esperanta traduko ĵus aperis) apartan atenton direktas al la vortoj de Marx. Neniu socialisto povas opinii, ke la momento de la venko de proleta revolucio super kapitalistoj estas same momento de efektivigo de plena komunismo. Ne, ĝi estas nur unua, nepra, urĝa premiso por la sekvonta evoluo de l' proleta ŝtato al la komunismo.

Kompreneble, en landoj pli industriaj kaj kulturaj, ol estinta cara Rusio, post proleta venko efektivigo de socialismo postulus malpli da tempo, da turmento kaj oferoj. Kompreneble, helpo de la multnombra proletaro el Germanio, Anglio, Francio al la proletaro de Sovetio treege ekfaciligus, rapidigus la triumfon de socialismo, sed... sed malriĉaj laboristoj de Sovetio dume helpas la anglajn karbministojn, preskaŭ izolitajn. Ŝerco de historio.

Jen iom da teorio, por la klarigo de la demando interesiganta K-inon Mondhejmulo. Letere mi volonte liveros pli detalan respondon al interesiĝantoj pri la temo.

JA. KOKUŜKIN *(5250)*, Sormovo.

★

Ĉu Marks eraris?

(*Daŭrigo* [1])

Centralizo kaj koncentriĝo.

Antaŭ ol esplori ĉu en Usono okazas aŭ ne efektiva malcentralizo de l' kapitalo, necesas klarigi la diferencon inter la du supre cititaj vortoj de l' titolo, kiuj ŝajnas esti samsignifaj, sed kiuj havas en la marksista terminaro malsaman sencon.

Marks tre akre distingas *centralizon* kaj *koncentriĝon*. Ĉiu kapitalo grandiĝas senĉese per amasigo (akumulado) de supervaloro. Estas konate, ke la kapitalistoj ordinare konsumas nur parton de la supervaloro kaj ke ili uzas alian parton por pligrandigi sian kapitalon kaj daŭrigi la produktadon sur pli larĝa ŝtupo. Tiun procezon de kreskado de unuopaj kapitaloj per amasigo de ilia supervaloro Marks nomas *koncentriĝo*:

« La akumulado kaj la koncentriĝo, ĝin akompananta, ne nur okazas dise sur multaj punktoj, sed la kreskado de la funkciantaj kapitaloj estas traplektata de la kreiĝo de novaj kaj de la divido de malnovaj kapitaloj. Sekve, se la akumulado aperas unuflanke kiel kreskanta koncentriĝo de la produktiloj kaj de la komandeco super la laboro, ĝi aperas aliflanke sub formo de reciproka forpuŝiĝo de multe da unuopaj kapitaloj » (2).

Al tiu koncentriĝo de unuopaj kapitaloj, Marks kontraŭstarigas la *centralizon*:

« Al tiu dissemiĝo de l' socia kapitalo en multajn unuopajn kapitalojn aŭ al tiu reciproka forpuŝiĝo kontraŭstaras ĝia altirforto. Tio ne plu estas simpla koncentriĝo, identa je la akumulado. Tio estas koncentriĝo de jam formitaj kapitaloj, forigo de ilia unuopa memstareco, senpropraĵigo de unu kapitalisto de alia kapitalisto, aliigo de multaj malgrandaj kapitaloj en malmultajn grandajn kapitalojn. Tiu procezo distingiĝas de la unua je tio, ke ĝi havas kiel kondiĉo simple alian dividon de la ekzistantaj kapitaloj jam funkciantaj kaj ke, konsekvence, ĝi ne estas limigata de la absoluta kresko de la socia riĉaĵo aŭ de la absolutaj baroj de akumulado! La kapitalo akumuliĝas en la manojn de unuopulo ĉar ĝi forglitas el la manoj de multaj. Tio estas la ĝuste nomita *centralizo*, malsama al akumulado kaj koncentriĝo » (2).

El tio estas videble, ke la dubindaĵo en la usona evoluo estas ne la koncentriĝo (ĉar tute nature ĉiu kapitalo kreskas kaj kreskas), sed la centralizo; oni deklaras, ke la kapitalo ne forglitas el la manoj de multaj por kolektiĝi en la manoj de senĉese malkreskanta nombro, sed oni male klopodas pruvi, ke la kapitalo disdividiĝas inter grandiĝanta aro da personoj.

Krom tio oni devas distingi la *teknikan* kaj la *socian* flankojn de centralizo, la centralizon de la produktado kaj la centralizon de kapitalo kiel socia potenco. Neniu volus aserti, ke en Usono la produktado malcentraliziĝas; ke disiĝas grandaj entreprenoj je kelke da malgrandaj, sed malgraŭ la senĉese grandiĝanta amplekso de la produktado, malgraŭ la kreskado de la entreprenoj, pliiĝas ankaŭ la nombro da personoj havantaj posedrajton je tiuj produktilaregoj.

Jen kion oni nomas « malcentralizo » en Usono. Ciferoj statistikaj estas cititaj por montri la realecon de tiu tezo. Estas nun la demando, ĉu tiu fenomeno efektive kaj nepre kontraŭdiras la marksistan teorion.

---

*) Aŭ: Laŭkapabla produkto, laŭbezona ricevo.

1) Vidu la n-rojn 99, 102, 103, 104, 105, 106 de « S-ulo ».

(2) « La Kapitalo », franclingva eldono (Molitor), I-a vol., 4-a libro, 23-a ĉap., paĝo 90.

Sed ni rememoru, ke laŭ Marks la teknike progresintaj entreprenoj donas superprofiton en la konkurenco kun la aliaj, mezteknikaj produktejoj; ni rememoru, ke la apliko de tiu marksa tezo al la angla situacio de l' pasinto permesis al Engels, klarigi la bonan vivostaton de la angla laboristaro, kiu ricevis de sia burĝaro parton de la superprofitoj sub formo de salajroj pli altaj ol la mezaj salajroj de la tuteŭropa proletaro; ni rememoru ke Anglio perdis sian mondmerkatan monopolon kaj ke anstataŭ ĝi, nun Usono havas la superecon en la tutmonda komerco. Tiam ni komprenas, ke la usona burĝaro povas doni al siaj laboristoj parton de la superprofitoj, same kiel antaŭe agis la britiaj kapitalistoj. Nur la formo ŝanĝiĝis: la transdono de parto de la superprofitoj okazas ne nur per supermezaj salajroj, sed ankaŭ per partopreno de laboristoj je la profito, per posedo de akcioj. La ekzisto de laboristoj-akciuloj signifas nur, ke la usona laboristaro partoprenas modestgrade (mi poste montros ke tiu grado estas *tre*ege modesta!) je la superprofitoj de la usona kapitalistaro.

Ĉu tio estas malcentralizo de kapitalo? Eksteraspekte jes. Sed ne la ekstera aspekto gravas; gravas la reala esenco.

Venas la demando ĉu tiuj laboristoj-« kapitalistoj », posedantaj akciojn, havas faktan, efektivan influon je la gvidado de la entrepreno. Ĉiu scias, ke ekzistas diversaj kategorioj de akcioj: simplaj akcioj kaj privilegiaj akcioj. La posedantoj de simplaj akcioj havas malpli gravajn rajtojn — kelkfoje neniajn — ol la posedantoj de privilegiaj akcioj. Tiuj lastaj estas ordinare la « fondintoj » de la entrepreno: bankistoj kaj aliaj ĉefaj mondonantoj. Ilia volo — kaj *nur* ilia volo! — gvidas. La aliaj, eĉ se la tuta sumo de iliaj akcioj estas pli granda ol tiu de la privilegiitaj akciuloj, ne havas la same grandan voĉonombron en la ĝenerala kunveno; kaj *eĉ se ili ĝin havus* (kio reale neniam okazas), ili ne povus ĝin uzi. ĉar ili estas multnombraj, multideaj kaj disopiniaj kontraŭ la unuigita, sola, facile efektivigebla potenco de kelkaj gvidantaj personoj, kiuj konas ĉiun radeton de la administra mekanismo. Tiel la akcioj de la laboristoj-akciuloj, kiuj estas kreditoroj de la entrepreno, ne estas signo de malcentralizo, sed signo de plej akra centralizo, en la manoj de la plej fortaj kapitalistoj, de sumoj eĉ ne apartenantaj al ili.

Jen kiel Marks prijuĝas tiun fakton:

« ... la kapitalista produktado elburĝonigas potencon, la krediton. Ĉi tiu fariĝas komence tute nova kaj potenca armilo en la batalado inter konkurantoj. Poste, per nevideblaj fadenoj ĝi tiras en la manojn de unuopaj aŭ kunigitaj kapitalistoj la financajn rimedojn dissemitajn en la socio plimalpli grandamase. Ĝi estas la *specifa maŝino de la centralizo de la kapitaloj* » (1).

« ... la kredito donas al la nnuopa kapitalisto aŭ al homo konsiderata kiel kapitalisto, disponrajton, en certaj limoj absolutan, super fremda kapitalo kaj fremda propraĵo, kaj sekve, super fremda laboro. La kapitalo mem, posedata reale aŭ laŭ opinio de l' publiko, fariĝas nur bazo de la superstrukturo de l' kredito... Tiu senpropraĵigo (kapitalistoj senpropraĵigante unuj la aliajn. L. R.) prezentiĝas en la kapitalista sistemo sub kontraŭeca formo: malmultoj proprigas al si la socian propraĵon; kaj la kredito donas al tiuj malmultoj ĉiam pli kaj pli la karakteron de simplaj spekulaciistoj. Ĉar la propraĵo ekzistas tie sub formo de akcio, ĝia moviĝo kaj transdono fariĝas pura rezulto de borsa ludado, kie la malgrandajn fiŝojn glutas la ŝarkoj, kaj la ŝafojn la borsaj lupoj » (1).

La evoluado de l' kapitalismo en Usono do ne kreis ĝis nun novajn faktojn ne antaŭviditajn de Marks. Ni vidas kontraŭe, ke eĉ la fama « malcentralizo » estis sufiĉe trafe karakterizita en liaj verkoj, kaj ni vidas, ke tio, kio ŝajnas esti malcentralizo, aperas post forigo de la trompiga vualo kiel *kredito*, kiu estas, laŭ Marks. la « specifa maŝino de la *centralizo* de la kapitaloj ».

Pri aliaj faktoroj, krome klarigantaj la altajn salajrojn, ni parolos en sekvanta artikolo.

L. Révo.

(1) « La Kapitalo », franclingva eldono (Molitor), I-a vol., IV-a libro, 25-a ĉap., pĝ, 91.

(1) « La Kapitalo », germanlingva eldono, III-a, vol., I-a libro 27-a ĉap., pĝ. 426-27.

IMPOSTOJ

Impostoj parolas. Se la esploristoj de malaperinta civilizacio trovus la buĝeton de tiama nacio, ili povus ekkoni multon pri ties vera karaktero. Ekzemple, ĉu la eroj, 1, 7, 8, 9 ne elmontras la hipokritecon de la pacproklamoj de la nuntempaj registaroj? Mi ne volas komenti pri la buĝetoj, sed mi supozas ke la buĝeteroj enhavas intereson por la SAT-anoj. Jen la elspezoj de Anglio por la jaroj 1925-26:

	Sterlingaj funtoj.
1. Por la procentaĵo de la nacia ŝuldo	305.000.000
2. Amortiza kaso de la nacia ŝuldo	50.000.000
3. Ŝoseo-prizorgado.	16.000.000
4. Pagoj al provincaj kontoj. .	13.329.000
5. Landkoloniado	700.000
6. Pagoj al Norda-Irlando . . .	4.000.000
7. Aliaj kunigitaj kasaj servoj.	2.000.000
8. Militistaro	44.500.000
9. Militŝiparo	60.500.000
10. Militaeroplanaro	15.513.000
11. Publika edukado	46.498.000
12. Pensioj al ge-maljunuloj . .	26.856.000
13. Fako de pensioj	66.026.000
14. Ministerio de Laboro . . . . (enoficigo de ekssoldatoj ktp.)	13.859.000
15. Ministerio de nacia sano . . (Nacia asekuro ktp.)	22.254.000
16. Polico, malliberejoj ktp. . .	8.790.000
17. Mez-Oriento	4.770.000
18. Kompensaj pagoj en Irlando.	441.000
19. Helpoj al senlaborularo . . .	2.296.000
20. Aliaj civitaj pagoj.	30.819.000
21. Doganoj	11.391.000
22. Poŝtoficejaj servadoj	52.958.000
Sume . . .	799.400.000

Tiel ni vidas, ke la eroj 1, 2, 8, 9, 10, 16, 17 kaj 14, 15 (grandparte), kies sumo atingas 564.696.000 s.f., do pli ol du trionoj, rezultas de naciemo, policbezoneco kaj militemo.

1242.

Blindaj sovetiaj proletinfanoj helpas la anglajn ministinfanojn

Elskribo el la protokolo de infankunveno en Perma infanazilo N-ro 10 (blindullernejo) de 3 septembro.

Oni aŭskultis: Proponon de lernantino Manja Noskova pri helpo al la infanoj de anglaj ministoj. « Ĉiuj helpas, kaj ankaŭ ni devas helpi. Mi petas la infanojn, tuj priparoli ĉi-demandon. »

Oni decidis per plimulto da voĉoj: ŝpari dum unu semajno sukeron, ĉiu po unu peco (oni ĉiutage por teo disdonas al ĉiu infano kelkajn pecetojn da sukero), kolekti tiamaniere 5 funtojn, vendi ilin, kaj la monon, 1 rublon 50 kopekojn, sendi al anglaj ministinfanoj. Oni komuniku pri tio en gazeto, por ke eksciu pri tio ankaŭ aliaj, kaj ankaŭ helpu, ĉiu laŭpove.

El Perma gazeto « Zvezda » de 17-9-1926.

ATENTU!

La 1-an de novembro, Smolenska SAT kaj SEU organizaĵo solene festos sian unuan jarjubileon. Ni petas ĉ. K-dojn helpi al ni, sendante salutleterojn kaj aĵojn por ekspozicio. Adreso: Sovet-Unio, Smolensk, Redakcio « Krasnoarmejskaja Pravda », al *R. Nikolskij* (SAT 5241).

ATENTU! GRAVE!

« SAT-rondo Solingen » organizis gazetservon por laboristaj gazetoj. Ni nepre bezonas koresp-aĵojn el ĉ. l. pri ĉ. temoj, koncernantaj la laboristaron. K-doj la Gazetservo estas la plej praktika k. plej bona propagando. Adresu viajn leterojn al: K-do *Fritz Palm*, Klingenstr. 107, *Solingen* (Germ.)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

ĴUS APERIS! PROPAGANDISTOJ!

Ukrainlingva agentejo de l' famekonata Eldonejo « La Nova Epoko » ĵus aperigis la unuan en Sovetio ukrainlingvan eldonaĵon pri kaj por esperanto:

LA MONDLINGVO ESPERANTO KAJ LERNEJO

de E. Izgur.

ENHAVO: Neceseco de mondlingvo por la Lernejo. — Esperanto en Lernejo, ĝia valoro, utilo, praktika aplikado. — Esperanto en literaturo. — La taskoj en la ukrainia lernejo. — Manifesto de l' tutmonda pedagogia konferenco. — Oficialaĵoj. — Kion legi pri kaj en Esperanto.

Aldono: Gramatiko — Vortfarado (afiksoj).

Prezo: 20 kop.

Mendintoj de ne malpli ol 100 ekz. ricevas rabaton 30 %.

Oni plenumas nur *pagitajn* mendojn.

Adreso de l' deponejo:
Kremenĉug. Ukr. Argentejo « Nova Epoko », *V. Kolĉinski.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

LA PLEJ UZINDA INSTRUILO : « PETRO » (1)

Se estus farindaj iaj riproĉoj pri *Petro,* oni povus diri, ke la tro modestaj verkintoj, ne sufiĉe valorigis la signifon de la libro, por la laborista movado, kaj eble, ankaŭ, ne sufiĉe detale klarigis la parolmetodon uzindan.

Ĝis la apero de *Petro,* oni uzis en esperantaj kursoj, la t. n. « gramatikan metodon ». Tiu metodo malsimpligas esperanton, kaj malfaciligas ĝian lernadon. Kun *Petro* aperis nova kursmetodo. mirinde simpla, dank' al kiu la kursoj de esperanto fariĝis vivaj kaj plensukcesaj. Antaŭe, ili preskaŭ ĉiam malsukcesis, kaj la plej multaj esperantistoj mem instruiĝis. Per tia metodo sukceso rezultas nur de persona laboro, neniam oni povus fari amasmovadon. La laboristoj bezonas kursojn por lerni esperanton. Nun, oni povas fari fruktedonajn kursojn. La signifo de *Petro* estas, ke ĝi estas rimedo por pligrandigi la procenton de veraj laboristoj en nia movado por enprofundigi esperanton en la *laboristaj* amasoj.

Ne mirinde estas ke kelkaj K-doj ne komprenis la valoron de *Petro* tuj je la komenco. Tiu gravega verko estas tre modestaspekta, kaj unuavide aperas kiel simpla legolibro. Atentu! Pli bone estas tute ne uzi *Petro*'n ol uzi ĝin kiel legolibron por kompletigi alian metodon.

Kiel instrui ? Nur per simpla esperanta parolado, senĉesa ripetado de facilaj demandoj kaj respondo, per esperanta rakonto de la estinta leciono. Kompreneble, por havi eblecon paroli, oni devas antaŭe traduki kaj klarigi esperantajn vortojn, gramatikajn regulojn, frazojn de la leciono. Sed la pozitiva kaj plej longa parto de la leciono estas la parolado.

Petro naskas grandan intereson inter la lernantoj. Anstataŭ esti tedataj per pasiva aŭskultado de la longa nacilingva parolado de la instruisto, ili partoprenas aktive la kursojn kaj konscias siajn rapidajn progresojn. La gvidanto devas atenti ne iri tro rapide, aliel la lernantoj ĉesus kompreni, progresi, kaj interesiĝi. Spertoj montris, ke kun K-doj kiuj preskaŭ ne laboras hejme, oni povas instrui nur duonon de rakonto de *Petro* en ĉiu duhora leciono. Kun aliaj, oni instruas ĉiufoje unu rakonton.

Ĉar la metodo de instruado per *Petro* estas tre simpla, tre facila, ĉiu laboristo, kiu sukcese finas kurson, povas tuj fariĝi taŭga kursgvidanto, eĉ antaŭe akiri, per necesa praktikado, plej bonajn konojn de la lingvo. (En fino de kurso, la lernantoj mem kutimiĝas fari demandojn, kaj siavice gvidas la kurson). Tiu rapida formado de novaj instruistoj, neebla per aliaj metodoj, estas la sola vojo por atingi amasmovadon. Ĝi permesas havi ĉiam gvideblajn kursojn, kun neniam pli ol 15, 20 K-doj. Kaj ni povas esti certaj, ke, kun helpo de *Petro,* simpla laboristo instruos pli bone siajn K-dojn ol sciencplena profesoro, kun teoria metodo.

Fine, *Petro* estas tutmonda lernolibro, per kiu devus instrui la SAT-anoj el la tutmondo.

Ŝig.

(1) Estas preparata nun dua eldono (20.000 ekz.) kun multaj plibonigoj.

PRI ESPERANTA FILOZOFIA TERMINARO

Ĉiu K-do tradukinta sciencverkajon esperanten, sentis la mankon de tia ellaborita terminaro. Apartan malfacilecon kaŭzas la psikologi-filozofia terminaro, kiu havas malpli da komunaj greko-latinaj radikoj, kiuj unuigas ĉiujn aliajn sciencojn. Ne necesas paroli pri la nepra neceseco de unueco, komune akceptita esp-a terminaro.

Eĉ profesiaj nacilingvaj tradukistoj ĉiam spertas multajn tiajn malfacilaĵojn. Do, ankaŭ nia laboro ne estas rapide kaj senpene farota. Ni bezonas komunan laboron de kompetentuloj. Prilaborante de post kelka tempo ĉi demandon, mi petas la K-dojn kompetentajn kaj interesiĝantajn interrilati kun mi pri eventuala kunlaborado. Konsiloj, konsideroj, notaĵoj estas danke akceptataj.

J. I. Ŝapirŝtejn (5233) Sovetio, Minsk.

★

ONI MALLAŬDAS

En Sennaciulo oni kelkfoje renkontas la rubrikon « La SAT-aparato servas ». Sed neniam ni parolas pri okazoj, kiam tiu aparato ne servas. Tio estus tamen pli grava ol la fierado pri sukcesoj. Mi volas sciigi okazon, kiu ne devus ekzisti en nia laboro. Dum fino de aŭgusto, petite de komunista kaj komjunula kolektivoj de la Tvera kavalaria lernejo, mi dissendis al eksterlandaj K-doj 25 leterojn kun la peto trovi por la nomitaj organizoj similajn kolektivojn kaj ĉelojn por la interkorespondado. La adresoj estis parte prenitaj el «S-ulo » kaj jarlibro, parte donitaj al mi dum la kongreso. Krom tio la loka gazeto « Tvera Vero » presigis en « S-ulo » anoncon, kun la peto al eksterlandaj K-doj, liveri materialon al ĝi, por la enpresado en la « fako de internacia laborista korespondanto ». Al mi respondis nur du K-doj kaj « Tvera Vero » ricevis eĉ ne unu respondon. Ĉu do la decido de VI-a kongreso pri organizo de « Labinkor » restos neplenumata ?..

1116.

★

Disputego okazis en fabrikejo inter laboristoj pri aperinta artikolo en laborista gazeto, kiu, laŭdire estis ĉerpita el la rusa gazeto *Pravda*. Tiam, subite voĉo eksonis. Kial disputi ? Jen estas kolego, kiu estas bona esperantisto, li havas korespondantojn en Moskvo, nu, li havigu la veron al ni. Aprobite.

Apogante min sur nian statuton, kies unuaj linioj tekstas : utiligi praktike nian lingvon por la klasaj celoj de la laboristaro, mi fidele skribis al Centra komitato de S. E. U. petante informon pri la disputpunkto. Ĝis nun silento. Sed ĉiutage preskaŭ oni demandas : ĉu venis respondo ? Bedaŭrinde ne. La rezulto estas : misfido, duboj pri la praktikeco de esperanto, kaj la propaganda laboro ĝisnuna parte per tiu « servo al la proletaro » estis vana !... Mi tamen atentigis la C. K-anojn pri nepra neceseco de respondo, por ke ni ne ŝajnu fanfaronuloj.

Same mi povus plendi rilate al laborebleco en Sovetio, sed tio jam okazis en n-ro 104 kaj remaĉi mi ne volas...

Voko (Leipzig).

★

KRONIKO

Francio.

Bourges. — La 29 sept. estis fondata en nia urbo esp. lab. grupo, kiu aliĝis al F.E.O; al la grupo aliĝis tuj 13 anoj kaj aliaj baldaŭ aliĝos. La estraro konsistas el K-doj Delalande (prez.), Caillault (kasisto), Ernoux (helpskretario). Nune estas gvidataj du kursoj, krom tiuj estos malfermata alia kurso por komencantoj. Por tiu ni publikigos alvokojn en la loka kom. ĵurnalo, kiu jam konsentis represi ĉiumonate artikolon tradukitan el « S-ulo » ; artikoloj estas ankaŭ enpresitaj en la sindikata ĵurnalo « Le Syndiqué du Centre ». La 3 okt. okazis ĉi tie kunvenego, dum kiu ni disdonis propagandilojn kaj vendis lernolibrojn.

La estraroj de ĉiuj organizoj ĉi tieaj simpatias kun nia afero. Ni esperas, ke nia grupo, kiu havas bonan propagandkampon, kreskos rapide. La alilandaj esp. grupoj kiuj volas interkorespondadi kun ni, skribu al : Groupe Esperantiste Ouvrier, Maison du Peuple, 8, Place Malus. Bourges (Cher) Francio.

La Sekretario : *SAT-ano 5820.*

Sovetio.

Moskvo. — Antaŭ nelonge ĉe la Branska stacidomo post raporto pri esp-o de K-do A. Liljer, oni organizis esp-an societon « Reciprokhelpo ». La celo de la societo estas praktika uzado de esp-o por reciproka helpo en la kulturaj interrilatoj de rusaj laborantoj kun eksterlandaj. La societo ĉion faras kolektive, ankaŭ kolektive SAT-aniĝis k. abonis « S-ulo »-n. « Reciprokhelpo » eldonas murgazeton k. dume aperigas artikoletojn pri esp-o k. ankaŭ leterojn de rusaj laboristoj kun la respondoj de eksterlandaj. Ankaŭ ĝi aperigas artikolojn en la kluba murgazeto « Krasnaja Brjanka », kiu havas sufiĉe da legantoj, ĉar la loka fervojista klubo nombras 2.900 anojn. Similaj esp-o societoj « Reciprokhelpo » aperas en diversaj urboj sovetiaj. La moskva societo deziras serioze korespondadi kun similaj societoj. Krom tio ĝi komunikas, ke ĝi povas kunligi aliajn organizojn (kulturajn) de eksterlando kun analogiaj sovetiaj. Adreso de la societo : Moskvo 59. Branska stacidomo, Kontora Difi al sekretario de moskva societo « Reciprokhelpo » Aleksandro Liljer.

Niĵnij-Novgorod. — Dum la postkongresa semajno la urbon vizitis 21 SAT-kongresanoj el kiuj 17 estis ekstersovetianoj. Bedaŭrinde multaj alvenis dise, kio malfaciligis la aranĝon. La vizito havis grandan signifon por la SAT movado ĉi tiea. Kelkaj K-doj parolis dum kunvenoj, ekz. K-do Mark Starr (London) en kunveno de instruistoj, sama K-do k. K-ino B. France (Manchester) parolis dum kunveno de labor-korespondantoj. Ni havis kelkajn kunvenojn de esp-istoj, dum kiuj krom suprecititaj Gek-doj parolis, ankaŭ K-doj Sons (London), Whitham (Burnley), Klopfleisch (Düsseldorf), Adamson (Göteborg), Aas (Oslo) kaj Nixdorf (Herne) ; ili konatiĝis kun la estro de N-N. foiro K-do Maliŝer, kiu gastigis la suprenomitojn K-dojn en la foirdomo. Ankaŭ K-doj Adamson k. Nixdorf vizitis la Redakcion de loko tagĵurnalo « Niĵegorodskaja Kommuno ». Nun tre amike la redakcio rilatas al ni ; ĝi presis eĉ esperantlingve saluton al la alvenintaj Gek-doj, represas tradukaĵojn de leteroj k. artikolojn el Sennaciulo k. tre deziras havigi por siaj laboristoj-korespondantoj firman kunligon kun ekstersovetiaj laboristoj. La komenco estis metita per ra-

porto de K-do M. Starr k. la vizito de K-do Adamson. Nun necesas daŭrigi. La SAT-grupo fondis en la urbo filion de « SAT informservo » (SATIS) al kiu oni povas sin turni laŭ adreso de K-do *Konovalov (641).*

Ni petas ekstersovetiajn SAT-anojn kiuj deziras havi mem aŭ havigi por siaj kunlaborantoj, neesperantistoj ankaŭ, korespondadon k. konstantan ligon kun N.-N. laboristoj per esp-o, tuj skribi leterojn al Redakcio de « Nijegorodskaja Kommuna », ul. Sverdlova d. 23, Nijnij-Norgorod, Sovet-Unio.

Ni invitas nur seriozulojn, *ne sendu ilustritajn poŝtkartojn k. aliajn bagatelaĵojn!* Priskribon de la vivo de laboristoj ktp. nepolitikaĵojn aŭ ĝeneralajojn, la Red. volonte enpresos.



Ĉe la neŭtraluloj.

En Galati okazis, 11-13 sept. 1926, la VIa « Rumana Esperanto Kongreso ». Ĝin prezidis aktive, paroladante en esp-o, S-ro Trancu-Iaŝi, ministro de la Laboro. Li diris pri la pacemo de Rumanio, pri ĝia riĉeco, laboremo, progreso ktp., pri neceseco konigi tra la tuta mondo la veron pri Rumanio, kiu estas, liadire, kalumniata; unuvorte li metis esp-on je la servo de sia naciemo.

La Ministerio de publika Instruado estis ankaŭ reprezentata. Estis entute proksimume 200 kongresanoj. La korespondanto de « Heroldo de Esperanto », el kiu ni ĉerpas la informon, ne diris ĉu la « progresema » kaj « laborema » ministro de la Laboro klopodos por ke la registaro permesu al la esp. laboruloj rumaniaj aliĝi al SAT, sen ia risko esti ĵetataj en maliberejon.

Notinde estas, ke okaze de tiu kongreso estis aplikata en la kongresurbo speciala, senpera metodo por instruado de esp-o, elpensita de S-ro Andreo Ĉe. Laŭ la raportinto, en du semajnoj la lernantoj akiris sufiĉan esperanto-scion por povi senpene konversacii dum la kongreso. Tio estas mirakla, k. ni emas pensi, ke S-ro Ĉe, kiu estas pastro, petis specialan favoron de sia dio. La SAT-anoj eble sin turnu al la diablo (!) por ricevi ian similan favoron.

La 15-an de septembro 1926, subite mortis pro korparalizo la plej maljuna SAT-ano en Odessa (Sovetio)

K-do O. O. FRANCKEVIĈ
(SAT-ano 4025)

en la aĝo de 65 jaroj.

NIA POŜTO

Leganto el Azio. — 1) La vorto « ekiko » rezultas de preseraro; devus esti *ekipo.* 2) Oni same korekte povas diri : « esperanto en lernejon », aŭ esperanton en lernejon. En ambaŭ okazoj la frazoj ne estas kompletaj, kaj oni devas subkompreni verbon; la kompleta frazo estus : esperanto *estu* enkondukata en.....; en la dua okazo : oni *devas enkonduki* esperanton en..... 3) La formo *ekde* estas uzata de kelkaj aŭtoroj, al kiuj la tro larĝsenca signifo de la prepozicio *de* ŝajnas ne bona, kaj pro tio ili aldonas la prefikson *ek* kiu forigas en kelkaj okazoj ĉian dubon pri la senco de *de.* Nur la praktiko, la vivo povas decidi ĉu tia precizigo estas necesa aŭ ne. 4) Pri la ceteraj viaj demandoj atendu la respondon de *Fakulo.*

K-doj Barthelmess k. Sokolov. — La junulara paĝo aperos en la proksima n-ro. La bildo bedaŭrinde ne taŭgas por ricevi bonan kliŝon. — *Red.*

3380. — Ni sendis jam delonge vian jarlibron. Ni ne kulpas, se vi ne ĝin ricevis.

Adm.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Unuiĝo de Ligilo U. S. S. R.; Ricevebla ĉe *La Interligilo de l' P. T. T.* Paris (XVIIIe), 54, Rue Custine. Formato : 15 × 23 cm., 40 pĝ.; prezo : unu sesono de usona dolaro. Tradukita el la rusa lingvo de V. Ĵavoronkov.

La bele ilustrita, sur bona papero presita broŝuro, estas bona skizo kun multe da materialo pri evoluo kaj laboro de la profesia unuiĝo de la poŝtistoj telegrafistoj, telofonistoj kaj radiistoj en U. S. S. R.; multaj tabeloj kaj statistikoj pri vivkondiĉoj, salajroj, laborkondiĉoj kultur-kleriga laboro ktp. ktp. kaj la bonaj klarigoj kaj bildoj donas al la leganto de la broŝuro sufiĉe precizan bildon pri la vivo de la rusaj P. T. T.-oj.

M. S.

Universala Esperantistigilo. — De D-ro Benson. Eldono de Benson School of Esperanto, Inc., Newark, N. J., U. S. A. Formato 14 × 10 cm. Prezo : 0,25 dol. ĉiu libreto.

Ĉiu el la kvar libretoj, kiujn sekvos aliaj, entenas unu lecionon, aranĝitan per bildoj; estas ĉe la komenco antaŭparolo kaj klarigoj pri elparolmaniero por anglolingvanoj, kun noto, ke ekzistas samaj por ĉiuj lingvanoj.

Por juĝi pri la valoro de tiu lernmetodo, necesus memuzadi ĝin dum kelka tempo. Nur la sperto ja povas decidi tiurilate. Almenaŭ estas notinda la fakto, ke pli kaj pli montriĝas la emo instruadi nian lingvon, ne uzante nacilingvajn lernolibrojn. Oni povas nur deziri ke plivastiĝu, pliprofundiĝu tiu emo.

E. K. L.

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso : Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ : L — letero, PK — poŝtkarto, PI — poŝtkartoj ilustritaj, PM — poŝtmarkoj, bfl. — poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj, esp-ajo — esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

K-do *Josef Leser,* Geiselbergstr. 48/451/pt. 2-a, *Wien, XI.,* dez. interŝ. esp-aĵojn, ĵurnalojn, PK, PI, bfl. k. ĉ. l. Certe resp.

Ĉekoslovakio.

Du junaj esp-istoj dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. krom Germanio k. Ĉekoslovakio, PI, bfl. Adr. : K-do *Josef Rehor, Dolní Maxov ap. Jablonec n/N.*

— K-do *Josefo Wojewoda,* Dölni Osada, 365, *Mar. Hory,* pri ĉ. t. k. ĉ. l. PK, PI.

— K-do *Bohumil Stanek,* Privozská, 189, *Mar. Hory,* pri ĉ. t. k. ĉ. l. PK, PI.

Germanio.

K-do *Kurt Büttner,* Jakobstr. 44, *Chemnitz i. S.,* dez. interŝ. PI, bfl., PM, k. ĉ. l. Resp. garantiata.

— K-do *Gerhard Langner,* Bahnhofstr. 8, *Görlitz i. Schles.* dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PK, PI, bfl., PM., esp-aĵoj, k. ĉ. l. Ĉiam resp.

— K-dino *Doris Stangl,* Hoferstr. 55, *Leipzig- C 1.,* dez. koresp. pri virina movado kaj aliaj temoj k. K-inoj el ĉ. l. L., PI.

— K-do *Alfred Stoll,* Waldstr. 14, *Lausa b. Dresden* pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

— K-do *Fritz Kramer,* Altenburger Str. 93, *Lunzenau i. S.,* dez. koresp. PI, PM, bfl. k. ĉ. l.

— K-do *Fritz Mossig,* Canzlerstr. 28, *Burkhardtsdorf i. Erzgeb.* dez. koresp. L, PI, bfl. gazetoj. Tuj resp.

— K-do *Kurt Hensel,* Badergasse, 125, *Mügeln Bez. Leipzig,* dez. koresp. kun bakistoj k. amator-fotografistoj.

Italio.

K-do *Heinz Ruedl* (pentristo), Corso reĝ. Elena, 8, a. adiĝe, *Bolzano,* dez. koresp. k. ĉiul. ge k-doj, precipe kun fraŭlinoj. L, PK.

Litovio.

K-do *J. Balĉiunas,* Vilniaus g-ve, 19, *Pasvalys,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

Nederlando.

Juna socialisto dez. koresp. pri ĉ. temoj. Ne kun germanoj. Adr. : K-do *Wim Kraaij,* Bothastraat, 33, *Helder* (N. H.)

Polio.

K-do *Edv. Sosnowski,* Staszica, 26, *Sosnowice,* dez. koresp. PI. k. ĉ. l. Resp. garantiata.

Sovet-Unio.

K-do *A. J. Jurĉenko,* ul. Libknehta, 45, kv. 12, Sovpartŝkola, *Ĥarkov,* dez. koresp. pri lab., junul. k. sindikata movadoj, K, PK, PI, k. ĉ. l.

— K-do *S. Sostavkin, Zavitaja,* Amursk. okr., dez. koresp. pri div. temoj, L, PK, PI, k. ĉ. l.

— K-do *J. Salaev,* Topografskaja, 30, *Poltorack,* pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PK, PI.

— K-do *Nikolao Ĥolm,* Voznesenska 9, *Kiev-Stalinka,* pri radio k. ĉ. l.

— *Adresŝanĝo :* K-do *Aleksandro Liljer,* Brjanska stacidomo. Kontora D. H. I., Moskvo, 59, sciigas, ke nur ĉi-adreso estas valida. Kolektas glumarkojn, special. prop. markojn esp. kaj rekompence sendas simplajn PM. Min interesas nur serioza korespondado. Ĉiam resp.

— K-do *V. Kotelevcev,* Jukovskaja, 41, *Ekaterinoslav,* dez. koresp. pri lab. vivo, tekniko, politik-ekonomiaj temoj, L, PK, PI, fot-aĵoj. Ĉiam resp.

— K-do *V. Kotelevcev,* Jukowskaja ul. 41, *Ekaterinoslav,* pri ĉ. temoj. k. ĉ. l. L. PI. Resp. garantiata.

— K-do *A. Sidorov* (ruĝarmeano) N strelkovij polk Dondivizii. *Rostov/Don* serĉas koresp-antojn por reciproka interŝ de artikoloj pri militistaj demandoj k. lab. aferoj. Represas en sovetiaj diversl. gaz. k. ĵurnaloj.

— K-do *Rizvan Kasimov,* Taŝkentskaja, 7, *Poltorack* (Turkmenio) dez. koresp. k. ĉ. l. Certe resp.

Svisio.

Adresŝanĝo : K-do *K. Deutschele,* 21, im Heimatland, *Basel* (stratŝ.)

ALVOKO

K-do *Vikentij Budrik* serĉas en Sovet-Unio sian edzinon *Stefanija Vikentievna Budrik* kaj *filojn : Stanislav* naskita 1911, *Vladislav* 1915, perdintajn en la jaro 1922 post translokiĝo el Leningrad en Ekaterinoslav, Basejnaja ul, 22. kv. 2. Li elveturinta Litovion serĉis ilin kun helpo de konatuloj k. registaro, sed klopodoj estis vanaj. K-doj de Sovet-Unio konsentantaj helpi anoncu en ŝtataj gazetoj pri tio k. klopodu. Elspezojn por sukcesaj zorgoj li repagos. Adr. : *V. Budrik,* Kraĵiu gtv. 22. *Kelmė* (Litovio.)

Le Gérant : L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. Solsona, 9, Rue Hallé, Paris-14e — Telefono : Gobelins 62-71